
三悪趣なき世界を

La Mondo sen Tri Malbonaj Sferoj

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

私が仏教を学び始めた頃、恩師から教えられたことで最も強く印象に残っている言葉の一つに、「聖典と新聞の間に身を据えなさい」というのがあります。もとは安田理深という先生の言葉のようです。

世間ではよく、「坊さんというのは世俗から距離をおいて、泰然自若として、心を鍛えるべきである」というイメージを持たれがちです。ひたすら聖典（経典）を読み、よく勉強している僧侶は、たしかに人々の尊敬をうけることでしょう。これに対して、デモに参加したり訴訟を起こしたりする僧侶は、「坊さんのくせに」と非難を浴びることがあります。

「聖典と新聞の間に身を据える」とは、聖典ばかり読んで世間のことに何ひとつとして関心を持たないような僧侶ではダメだ、また逆に世間のことばかりに関わりあっていて、聖典を読まないようではこれもダメだ、ということでしょう。私は以来、仏教の教えに立ちながら、仏教を基本理念として現実社会に対して批判的に対峙するような仏教者でありたいと願ってきました。

私は浄土真宗の僧侶ですが、浄土真宗の根本聖典は「無量寿経」です。この経典の眼目は、法蔵菩薩が誓願を立ててその結果として阿弥陀仏となった、

Kiam mi komencis lerni budhismon, mia gvidanto prezentis unu maksimumon, kiu tre impresis min tiam: "Metu vin inter Sankta Libro kaj ĵurnalo." Ĝi devenis de la prelego de Yasuda Rizin.

Oni ĝenerale imagas, ke bonzo devas esti trankvila for de mondaj aferoj kaj hardi sian koron. Certe bonzoj, kiuj fervore legas Sanktan Libron kaj lernas budhismon meritas publikan respekton. Dume bonzojn, kiuj partoprenas manifestacion aŭ procesas, oni riproĉas, dirante ke tio ne konvenas al bonzo.

Kion signifas "sin meti inter Sankta Libro kaj ĵurnalo"? Laŭ mia kompreno, bonzoj devas ne malhavi intereson pri sociaj aferoj sin direktante nur al Sankta Libro, kaj samtempe devas ne forlasi Sanktan Libron nur rilatante al sociaj aferoj. Post la ekscio pri tiu ĉi maksimumo mi deziradis esti budhano kritike alfrontanta realan socion surbaze de la fundamenta ideo de budhismo.

Mi estas bonzo apartenanta al Ŝin-budhismo, kies fundamenta Sankta Libro estas la Sutro pri Nemezurebla Vivo. La esenco de tiu ĉi sutro estas klarigi la votojn de la Bodhisatvo Dharmakara, kiu fariĝis la Budho Amitabho pro la merito de la votoj. La votoj, aŭ pli ĝuste dirite

という由来にあります。その誓願、あるいは本願は全部で四十八ありますが（康僧鎧訳による）、その第一は、無三悪趣の願です。素直に考えれば、この願こそが仏の最大の願いであり、仏教の根本でもあります。それは次のように述べられます。

たとい我、仏を得んに、国に地獄・餓鬼・畜生あらば、正覚を取らじ。

三悪趣とは、いわゆる六道のうち、下位の三世界、地獄・餓鬼・畜生をいいます。これが何を意味するのかについて、さまざまな議論があるところです。生前の行為に随って死後に再生する世界のことである、という考え方もあるでしょう。しかし、法蔵菩薩が「私が建設する仏国土からは地獄と餓鬼と畜生があってはならない」と決意した、という趣旨からみるならば、これらを死後の実体的世界と見るのは無理がある、と私は考えます。なぜならば、三悪趣が実体的世界であるとすれば、それらを無くしたいという願いは意味を持たなくなってしまうからです。それらを無くしたいというからには、三悪趣は分類された固定的世界のことではなく、現実社会ないし衆生のありかた・現象を示唆しているはずです。

三悪趣は具体的に何を意味するのでしょうか。まず地獄は、もっとも重い罪である殺生に関係します。「人を殺したら地獄に堕ちる」といいます。これが衝動的な殺人ならば、懺悔によって救われることもあるでしょう。しか

Primaraj Votoj nombras entute 48 (laŭ la versio de Sanghavarman); la unua voto estas pri malesto de tri malbonaj sferoj. La unua voto devus esti la plej granda kaj grava intenco de la Budho, do ĝi faras la esencon de budhismo. Ĝi tekstas jene:

Mi ne fariĝu Budho, se en mia lando troviĝus infero, malsatuloj kaj bestoj.

La tri malbonaj sferoj estas la suba duono de la t.n. ses mondoj. Oni havas diversajn opiniojn pri tio, kion ili signifas. Iuj opinias, ke ili estas postaj mondoj, en kiuj mortintoj renaskiĝas pro siaj agoj dum sia antaŭa vivo. Mi pensas alie, ĉar la intenco de la Bodhisatvo Darmakara estas en tio, ke infero, malsatuloj kaj bestoj ne ekzistu en lia konstruota lando. Tial la tri malbonaj sferoj ne povas signifi realan mondon postmortan. Se ili signifus realan mondon, la deziro ekstermi ilin fariĝus sensencaĵo. Reale ekzistanta mondo ne povas esti malaperigebla. Tial la tri malbonaj sferoj devas sugesti ne klasifikitajn fiksitajn mondojn sed estomanierojn aŭ fenomenojn de la reala socio aŭ estaĵoj tie vivantaj.

Do kion signifas la tri malbonaj sferoj konkrete? Unue, infero rilatas al mortigo, kiu estas la plej grava peko. Oni diras, ke tiuj kiuj mortigas homon, falos en inferon. Se mortigo okazis impulsite, saviĝo eblas pere de elkora pento. Mortigo multfoja kaj senpenta, aŭ daŭro de mortigoj, estas ja milito. Milito ne okazu, tio estas la

し恒常的かつ懺悔もない殺人、殺し合いが続くあり方、これは即ち戦争です。戦争があってはならない、これこそが仏の第一にして最大の願いです。

第二の餓鬼は、常に餓えと渇きに苦しむ衆生の住む世界であるとされ、これを過度の欲望を戒める意味で説かれているとされることが多いようです。しかし私の考えは少々異なります。今日においてさえ世界の飢餓人口が十億人近くにのぼり、年間千五百万人（そのほとんどは子ども）が餓死している、という現実にとってみると、仏の願いは飢餓そのものを無くすことにあるのではないか、と思えてなりません。飢餓の原因は食糧不足にあるのではなく、食糧配分の不公平さにある、と指摘されています。餓死をなくし子どもの栄養不良を改善することと、先進諸国における過度の欲望追求への戒めは、一つにつながっています。

これは貧富の格差の問題です。仏教は単に観念的な理想論をいつているのではなく、常に現実社会の問題に関わって、社会における人間解放と人格完成をめざしています。そのことは、同じ無量寿経における第三の願、すなわち悉皆金色の願においても明確にみることができま

たとい我、仏を得んに、国の中の人天、ことごとく真金色ならずんば、正覚を取らじ。

インド社会では周知のように厳しいカースト差別がありますが、アーリア系の上位カーストの人たちと、先住民のドラヴィダ系の下位カーストあるいは不

unua kaj la plej granda deziro de la Budho.

Due, pri malsatuloj. Oni ofte klarigas, ke malsatulejo estas la mondo de tiuj, kiuj suferas malsaton kaj soifon kiel punon pro troa avidemo en la antaŭa vivo. Sed mia supozo estas iom alia. Eĉ en la nuna tempo proksime miliardo da homoj en la mondo suferas malsaton, kaj ĉiujare dek kvin milionoj da homoj, plejparte infanoj, mortas pro malsato. Tiel estas la efektiveco. Sur tiu ĉi fakto mi ne povas ne imagi, ke la Budha voto estas neniigi malsaton mem. Fakuloj montras, ke la kaŭzo de malsato estas ne manko de nutroprovizo sed maljusteco de ĝia distribuo. La tasko ekstermi morton pro malsato kaj plibonigi nutrostaton de infanoj estas firmi ligita kun la averto kontraŭ troa avidemo en progresintaj landoj. Tio ĉi estas samtempe la problemo de diferenco inter riĉulo kaj malriĉulo. Budhimo predikas ne nur pri idealismo sed celas emancipon kaj plenumiĝon de homoj en la socio, ĉiam sin direktante al efektivaj sociaj problemoj. Tio ĉi estas klare videbla ankaŭ en la tria voto, la voto pri orkoloro de ĉiuj homoj.

Mi ne fariĝu Budho, se ĉiuj homoj kaj dioj en mia lando ne havus oran koloron.

Kiel bone konate, hinda socio havas severan diskriminacion pro kasto. Arja-devenaj superaj kastuloj kaj indiĝenaj dravidoj apartenantaj al la plej malsupera kasto aŭ al eksterkasta dalito

可触民の人たちとでは、明らかに皮膚の色が違います。金色はインドで尊ばれる色ですが、すべての人が、アーリア系もドラヴィダ系も関係なくすべて金色に輝いてほしいという願いは、カースト差別の廃絶の願いの表現です。いやそんなのはうがちすぎの見解だ、というならば、悉皆金色の願は荒唐無稽な、つくり話になってしまいます。

第三の畜生については、人間と畜生の本質的違いに注目する必要があります。それは、人間は本能だけで生きているのではなく、理性がある、という違いです。私たちは人間と生まれた以上は、理性的に行動しなければなりません。享樂的利那的な生き方であってはなりません。

これらを要するに、無三悪趣の願とは、平和で貧富の差がなく人間的理性が尊重される社会の建設ということだと、私は理解しています。こうしてみると、何か難解で深遠な思想体系であると思われている仏教が、実は当たり前前のことを語っているのだと腑におちるのです。

社会は私たち一人ひとりが責任を持ちながら構成しています。ですから、どういう社会を目指すのかを真剣に考えるべきです。仏教者は新聞を常に読んで、社会の動向に注意をはらっていく必要があるのです。人間を不幸せにする社会システムを放置したまま、観念的な操作で幸福が得られるはずはありません。

havas evidente malsaman haŭtokoloron. Ora koloro estas estimata en Hindio. Do la voto, ke ĉiuj homoj egale, ĉu arjaj, ĉu dravidaj, brilu ore, estas la esprimo de la deziro al ekstermo de la diskriminacio pro kasto. Ĉu vi pensas, ke tio estas tro penetra interpreto? Se tiel, la voto pri orkoloro estus absurda kaj senbaza fantaziaĵo.

Pri la tria malbona sfero, pri bestoj, ni devas atenti la diferencon esencan inter homoj kaj bestoj. Homoj vivas ne nur instinkte; ili havas racion. Jen tio estas la grava diferenco. Ĉar ni naskiĝis kiel homoj, ni devas agi racie kaj ne vivi epikurisme kaj impulsisme.

Resume dirite, la voto pri malesto de la tri malbonaj sferoj signifas la konstruon de tia socio, en kiu oni vivas pace, diferenco inter riĉulo kaj malriĉulo ne ekzistas, kaj homa racio estas estimata. Jen tio ĉi estas mia kompreno. Se tiel, budhismo, kiu estas supozata ia malfacila kaj esotera ideologio, rakontas verdire tute memkompreneblan instruon.

Ĉiu el ni respektive havas respondecon por konsistigi nian socion. Tial ni devas sincere pripensi, kian socion ni celu. Budhanoj devas ĉiam legi ĵurnalon kaj atenti la socian tendencon. Homa feliĉo en la vera senco estas neebla per idea manipulado, se daŭras la socia sistemo, kiu igas homojn malfeliĉaj.